29. **Franca sekcio de ISAE** estas starigita kaj gvidata de provizora komitato de tri personoj: inĝ. E. François (delegito), leŭt. kol. A. Helleboid, inĝ. C. Naoumoff. La sekcio havas 54 membrojn, kaj do krom prof. M. Fréchet ankaŭ s-ro F. Gaume nun estas komitatano. La sekcio dissendis sian unuan cirkuleron. Ĉar la sekcioj povas havi aldonajn kotizojn por kovri siajn elspezojn la kotizo estas 600 fr. kaj ne 500 fr. kiel estas anoncita en informo 24.

30. **Norvega agadkomitato de ISAE** estas formita de la ISAE-anoj d-ro O. Reiersøl, inĝ. O. Rygg kaj s-ro C. Støp-Bowitz (delegito).

31. **Dokumentado.** En Nederlando kelkaj esperantistoj aranĝis daŭran laborgrupon „Esperanto en la Dokumentado", en kiu oni i.a. pritraktas la tradukadon de UDK.

32. **Japana kotizo** por aktiva membro (kun Scienca Revuo) nun estas fiksita je 540 jenoj.

33. **Helpabonoj.** Studenta Esperanto-Klubo, Kopenhago, pagis abonon de Scienca Revuo por ke la fratina klubo Studenta Esperanto-Grupo ĉe la Universitato de Osaka, Japanujo, ricevu nian revuon. Tio estas imitinda ekzemplo kaj rimedo starigi pli intiman kontakton kun membroj en landoj el kiuj oni ne povas sendi monon.

34. **Astronomio.** La ISAE-membro prof. d-ro *Y. Väisälä*, Astronomia observatorio de la Universitato de *Turku*, Finnlando, donis al du novaj asteroidoj (n-roj 1421 kaj 1462) la nomojn *Esperanto* kaj *Zamenhof*.

35. **Kongresa kunveno 1950.** La membroj de ISAE estas vokataj al kongresa kunveno dum la Universala Kongreso de Esperanto la 5-12 aŭgusto 1950 en la Sorbonne-universitato, Parizo, je tempo anoncota en la kongresa programo.

Propono de tagordo:

1. Aprobo de tagordo.
2. Elekto de sekretario por la kunveno.
3. Jarraporto kun ekonomia raporto. Revizora raporto.
4. Demando pri senŝarĝigo.
5. Budĝeto por 1950.
6. Raportoj: a) Unesco. b) Internacia Elektroteknika Vortaro. c) Kontakto kun aliaj oficialaj instancoj. d) Landaj raportoj. Terminara laboro.
7. Presigo de plurlingvaj propagandfolioj.
8. Aliaj demandoj.

Propono de budĝeto por 1950:

| Enspezoj | sv.kr. | Elspezoj | sv.kr. |
|---|---|---|---|
| 200 plenaj kotizoj ......... | 1230.00 | 200 abonoj de SR ......... | 1100.00 |
| 200 kotizoj sen SR ...... | 145.00 | afranko ......................... | 100.00 |
| | | presaĵoj, papero ............ | 150.00 |
| | | kotizo al UEA ............... | 15.00 |
| | | gajno .......................... | 10.00 |
| Sume sv.kr. ................. | 1375.00 (= £ 158.0.0) | Sume sv.kr. ................. | 1375.00 |

36. **Delegito de ISAE en Meksikio:** Inĝ. A. Luna Cardenas, Tehuantepec 27-J, MEXICO D.F. Jarkotizo de aktiva membro estas 12 pesoj.

Sven Alexandersson, sekretario de ISAE.



511.213 : 511.424

Estimata Sinjoro Redaktoro,

S-ro *S. J. Garvey* atentigis min pri du eraroj en mia artikolo pri la disfaktorigo de grandaj nombroj; ambaŭ rilatas al la nombro P (13, 101) (Sc. Rev. **1**, 52).

La unua, pli grava, estas ke la citita nombro *ne* inkluzivas 13 kiel faktoron; tio estas mia kulpo — la rezulto de mistransskribo el miaj notoj.

La dua eraro estas, ke la citita nombro enhavas la primon 79 du fojojn, nome estas oblo de $79^2$; ĉi tiu eraro, kiu ankaŭ aperas en la originala traktato de *Lehmer* (Amer. Math. Monthly, **1936**, 347), kompreneble neniel malutilas dum disfaktoriga uzado de la nombro. Por atingi la ĝustan valoron de P (13, 101) necesas nur obligi la cititan nombron per 13 kaj dividi per 79; la rezulto estas: —

P (13, 101) = 100 806 218 337 011 844 545 481 955 359 526 997.

Kiril Fabo.

546 : 001.4

S-ro *Austin M. Patterson* el Xenia, Ohio, Usono, membro de la Komisiono Internacia pri la Nomenklaturo de Kemio Organika, tutmonde konata inter la fakuloj pro la *„Ring Index"*, la *„Handbook of Chemistry and Physics"*, kaj pro sia kemifaka vortaro germana-angla, k.t.p., atentigas pri tio ke la „decidoj" de la Internacia Kemia Unio pri kiuj mi skribis en **Sc. R. 2** 40, efektive estas nur rekomendoj al la naciaj komitatoj kaj ke definitivaj decidoj ne estos farataj antaŭ 1951. S-ro Patterson opinias ke la angleparolantoj — kaj oni povus aldoni: france-, itale-parolantoj, k.t.p. — ne estos inklinaj akcepti la nomon *volframo* anstataŭ *tun(g)steno*.

Fine s-ro Patterson deklaras ke li tute konsentas kun s-ro Duncan (Sc. **R. 2** 39) pri la nedezirindeco alpreni ian tute novan kemian nomenklaturon por Esperanto.

378.183.4 = 089.2(489) : 378.18.067.1„1950"

**Internacia Esperantista Studenta Tendaro, Danujo 1950.**

En Kopenhago viglas Studenta Esperanto-Klubo (vidu ankaŭ ISAE-informon 33, p. 78), kies prezidanto estas la ISAE-delegito por Danujo (vidu la banderolon de ĉi tiu numero). Ĝi eldonas propran, ciklostilitan gazeton, per kiu ĝi esperas intimigi la kontakton kun similaj kluboj kaj kun unuopaj studentoj kaj universitatanoj en eksterlando. Aperos minimume 8 numeroj kun meze 6 paĝoj. Jarabono kostas 4 danajn kronojn aŭ 10 rpk. La S.E.K. kunlaboras kun Dana Internacia Studentkomitato, kiu aranĝos en la venonta somero 8 internaciajn studentajn tendarojn. En unu el tiuj la oficiala lingvo estos Esperanto. Ĝi estos Arkeologia „Tendaro"; (fakte oni loĝos en hotelo). Gvidate de inspektoro de la Nacia Muzeo, la partoprenantoj dum du semajnoj faros elfosan laboron en Aggersborg, fortikaĵo el la vikinga epoko. Oni laboros 40 horojn semajne, perlaborante 1 kronon tage. En la libera tempo estos ekskursoj, diskutoj kaj diversaj distraĵoj, en kiuj la partoprenontoj estas